Pastro D-ro J. B. Se-Tsien Kao, O.F.M., Esperantisto de 1925, multe laboris por la movado en Ĉinujo, Eŭropo, Norda kaj Suda Ameriko. Li estas Ĝenerala Vikario de Fongsiang, Ĉinujo, sed nun loĝas en Brazilo. Li sukcese organizis en Rio de Janeiro la Trian Esperantistan Eŭkristian Mondkunvenon en 1955 kaj verkis pri ĝi raportlibron aperintan en 1956. Li kunlaboris je la verko *Esperanto: The World Interlanguage* kaj verkis hispanlingvan Esperanto-vortaron.

Hans Herrmann Kürsteiner estas Honora Prezidanto de UEA de 1947, estis Prezidanto de UEA de 1942 ĝis 1947. Li aliĝis al UEA en 1908, kiam ĝi fondiĝis, kaj ankaŭ estas Delegito de UEA en St. Gallen.

D-ro Wilhelmus Johannes Arnoldus Manders, Akademiano, estas konata kiel aŭtoro de *Esperantologio kaj Interlingvistiko* kaj de *Vijf Kunsttalen*, ankaŭ kiel membro de la redakta komitato de la revuo *Esperantologio* kaj kiel aŭtoro de la Esperanto-traduko de la *Odiseo* de Homero el la klasika greka lingvo.

S-ino Eulalia Marks, en Norfolk, Virginia, estas Vicprezidanto de EANA de 1953. Ŝi multe vojaĝis en diversaj partoj de la mondo, de Nova Kaledonio kaj Aŭstralio ĝis Eŭropo.

Profesoro D-ro João Baptista Mello e Souza, Membro de la Konsilantaro de la Brazila Esperanto-Ligo, estis dum kelkaj jaroj ĝia Ĝenerala Sekretario. Li prezidis la 14-an Brazilan Esperanto-Kongreson. En 1910 li ĉeestis la Universalan Kongreson en Washington kiel oficiala reprezentanto de la brazila registaro. En 1950 li partoprenis en la transdono de la Esperanto-Petskribo al la Unuigitaj Nacioj. Li ĉeestis la Nord-Amerikajn Esperanto-Kongresojn en Portageville, N. Y., (1950) kaj en Detroit, Mich., (1956).

Ernesto Muñoz estas Prezidanto de la Studenta Esperanta Centro en Mendoza, Argentino.

Arthur C. Oliver estis Estrarano de IEL kaj UEA de 1937 ĝis 1955 kaj estis Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio en 1956-57.

Petro Stojan, naskiĝinta en Besarabio, Esperantisto de 1903, publikigis *Oklingvan Ornitologian Vortaron* en 1911, *Rusan-Esperantan Vortaron* en 1912, la monumentan *Bibliografion de Internacia Lingvo* en 1929, la verkon *Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto* en 1953. Forlasinte Rusujon en 1919, li vivis dum kelkaj jaroj en Jugoslavujo, poste en Rumanujo, en Svisujo kaj en Francujo.

D-ro Theo van Gindertaelen en Mechelen, Belgujo, estis Prezidanto de Flandra Ligo Esperantista dum dek jaroj, Komitatano de UEA de 1949 ĝis 1955, redaktoro de *Flandra Esperantisto* kaj ĉefredaktoro de tiu gazeto, kiam ĝi estis kombinita kun Nederlanda Esperantisto kaj poste ankaŭ kun Belga Esperantisto kaj Svisa Espero.

D-ro *Stephen Zamenhof*, Profesoro en la Medicina Fakultato (College of Physicians and Surgeons) de la Universitato Columbia en New York, estas filo de D-ro Henryk Zamenhof kaj nevo de la aŭtoro de Esperanto. Li estis membro de la Redakta Komitato de *Amerika Esperantisto* de 1946 ĝis 1954.

Legante la Deklaron ...

Legante la Deklaron kaj ĝiajn subskribojn, oni havas la impreson, ke la tuta sana kaj libera tradicio de la Esperanto-movado ribelas kontraŭ la aŭtokratecaj metodoj, kiuj esprimiĝas en la bojkotrezolucio. Ŝajnas, ke ĉiu ankoraŭ vivanta Esperantisto, kiu iam en la historio de nia movado okupis oficojn similajn al tiuj nun okupataj de D-ro Lapenna estas inter la subskribintoj: S-ro *Goldsmith*, kiu estis Ĝenerala Sekretario de UEA tuj antaŭ D-ro Lapenna; S-ro *Jakob*, kiu estis Ĝenerala Sekretario kaj Direktoro de UEA dum pli ol 20 jaroj; S-ro *Chavet*, kiu estris la Esperantistan Centran Oficejon en Paris jam en 1905, kiam UEA ankoraŭ ne ekzistis kaj kiu servis kiel Ĝenerala Sekretario de ĉiuj Universalaj Kongresoj de Esperanto de 1906 ĝis 1914; S-ro *Stojan*, kies esploro kaj dokumentado kreis la majstroverkon Bibliografio de Internacia Lingvo... Aliaj nomoj de subskribintoj elvokas similajn pensojn... Honoron, gratulon kaj dankon al niaj pioniroj!

— J. HENRY KRUSE, Jr.

ZAMENHOF PRI AMERIKA ESPERANTO-GAZETO

Letero al la Amerika Esperanto-Asocio (en 1907)

Fariĝis Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (1908) *

Kun plezuro mi eksciis el via letero, ke via societo intencas baldaŭ komenci la eldonadon de amerika esperantista ĵurnalo. Kompreneble mi povas nur tre ĝoji pri tio ĉi kaj deziri al via gazeto la plej bonan sukceson. Ne pro simpla ĝentileco mi tion ĉi diras: vian estontan gazeton mi efektive trovas tre grava, kaj mi efektive atendas de ĝi tre multe da bono por nia afero.

Ameriko estas tre grava por Esperanto kaj Esperanto estas tre grava por Ameriko; kaj tial la tago, en kiu aperos la unua bona gazeto esperantista en la plej grava lando de Ameriko, en la Nord-Amerikaj Unuigitaj Ŝtatoj, estos por nia afero tre grava dato. Ke via gazeto estos bona, pri tio mi ne dubas, ĉar mi konas bone la energion kaj bonan volon de ĝiaj fondantoj.

Mi estas konvinkita, ke vi sekvos la ekzemplon de la bonega kaj plej merita brita frato, kaj via gazeto baldaŭ fariĝos unu el la plej gravaj centroj esperantistaj, al kiu turniĝos la okuloj de la tutmonda esperantistaro.

Via, L. ZAMENHOF.

ANGLA OPINIO PRI AMERIKA ESPERANTISTO

Tro multaj el niaj naciaj gazetoj enhavas nenion daŭre gravan, sed kontentiĝas konstante elgardi grupraportojn kaj similajn aferojn kun nur loka efemera intereso. (Kompreneble ni havas ankaŭ gazetojn fakajn kaj literaturajn, pri kiuj ni rajtas fieri. Sed ne pri ili temas nun.)

Al mi ŝajnas, ke *Amerika Esperantisto* estas kelkrilate la plej grava nacia gazeto nun aperanta. Preskaŭ ĉiam ĝi enhavas artikolojn gravajn kaj faktoplenajn pri aferoj ne facile troveblaj aliloke. En 1956/57 ekzemple aperis plene dokumentitaj studoj pri Esperanto kaj la Fera Kurteno (Esperanto en Rusujo kaj landoj sub rusa influo), pri la ŝanceliĝado de Moskva lingvistiko, pri Stalin kaj Esperanto, kaj pri la iam laŭditaj, sed nun eksmodaj teorioj de Marr. Detalaj recenzoj pri *An Esperanto Vocabulary*, *La Internacia Lingvo*, *Retoriko*, kaj *Cervantes en Esperanto*, forlasis la modan kutimon aklami ĉiun eldonajon kiel novan ĉefverkon de nia literaturo kaj kuraĝis ilin serioze kritiki kaj prijuĝi. Ni legis biografiojn pri Ann E. Beatty, kiu ĵus mortis 99-jara kaj kies eksterordinara ĉefverko estas preskaŭ ne konata, pri 73-jara D-ro S. Kamarýt kaj lia longa honorinda Esperanta laboro, pri Richard H. Geoghegan, la unua Brita Esperantisto kaj la plej klera kaj elstara homo, kiu iam ajn aliĝis al nia movado – kies historio tamen (krom en unu-du paĝoj de malnovaj numeroj de *The British Esperantist*) estas preskaŭ nekonata kaj nenie trovebla. Ni trovas ankaŭ detalajn raportojn pri Esperanto en Enciklopedioj kaj pri la uzo de Esperanto por Medicina Scienco.

Mi bedaŭras la politikan kaj personan tendencon de kelkaj paĝoj, parte enspirataj de egale bedaŭrindaj atakoj kontraŭ EANA kaj AE. Pri tiuj disputoj mi ne esprimas opinion. Mi nur konstatas la fakton, ke AMERIKA ESPERANTISTO estas verŝajne nia plej serioza kaj certe plej interesa kaj faktoplena nacia gazeto.

Ĉiu aŭtoro devus bonvenigi kritikojn amikajn kaj ne vidi en ili personan atakon. Neniu pli forte kritikis multajn detalojn en *Plena Gramatiko* kaj *Plena Vortaro* (kaj ĝia *Suplemento*) ol mi en recenzoj en *The British Esperantist*. Tamen Waringhien kaj mi estas en tre amikaj rilatoj. Kaj se miaj propraj verketoj havas ian meriton, tio okazis dank' al la fakto, ke multaj amikoj afable sendis al mi korektojn kaj kritikojn, kiujn mi danke ricevis kaj nepre atentis por plibonigi estontajn eldonojn.

MONTAGU C. BUTLER, *Akademiano*

Profesoro D-ro Seiĥaro Nishi, Rektoro de la Gunma-Universitato, Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto kaj de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), sendis al ni tre flatan leteron pri *Amerika Esperantisto* de Marto-Aprilo 1957, "en kiu vi afable recenzis mian jubilean verkaron kaj samtempe detale koniĝis la nuntempan staton de Esperanto en nia medicina rondo." Profesoro Nishi tro modeste diras, ke "nia agado ne estas tiel vigla, kiel vi skribas en la revuo," sed daŭrigas: "Ni tamen ĉiam senlace klopodas enkonduki nian lingvon en la sciencon rondon. Precipe kuraĝigas nin la fakto, ke ni trovas multe da samekdeanoj inter usonanoj, kies nacia lingvo estas jam delonge uzata du-internacie."

ESPERANTA KRONIKO

Gravaj Kursoj en Esperanto: La kurso sub gvidado de *Prof. Fredrick C. Neumann* daŭras en "Elizabethtown College", Pa., kun novaj studentoj. Oni ricevas oficialan krediton de la edukaj instancoj por Esperanta studado. – La kurso sub gvidado de *Jon Willarson*, en Milwaukee, Wis., en la "Shorewood Opportunity School" daŭras ĉi-sezone kiel pasintjare. Tio estas bona 'oportuno' por Esperanto, kiel ankaŭ por la lernejo. – Tuta granda aro da kursoj en lernejoj por plenkreskuloj, estas tiuj pro la organizado de *Donald F. Walton* de la Esperanto-Asocio de Nov-Jersio. Jen listo de lokoj kaj instruistoj: Chatham, *Henry Kruse*; East Orange, *S-ino Leslie Davis*; Elizabeth, *F-ino Helen Kaczowski*; Elizabeth (por progresintoj), *David Jagerman*; Irvington, *F-ino Faith Hoekstra*; Morristown, *F-ino Doris Alfke*; Orange, *Donald Walton*; Newark, *F-ino Helen Walton*; kaj pro peto al S-ro Walton, de la Direktoro por Plenkreskula Edukado en Hempstead (L.I.) nun estas bela kurso de dekdu studentoj en la plenkreskula fako tie.

C. C. Cummingsmith, S.M., denove troviĝas sur sia amata insulo en Havajo, ĉe Honolulu, post vizito en Los Angeles dum la somero. Amikoj liaj tra la mondo ĝojos pro tio, ke li nun iom pli bone sanas kaj denove povas labori kiel bibliotekisto de la Kolegio Chaminade en Honolulu.

Eugene M. Beck, Baltimore, Maryland, utiligas ĉiujn rimedojn por propagandi Esperanton kaj subteni la asocion EANA. Li multe uzas propagandilojn, librojn, poŝtkartojn, leterojn, ktp. Li estas membro-patrono de EANA, kaj jam ĉeestis multajn kongresojn de la Asocio, – lastatempe en Newark, N. J. Antaŭ unu jaro, li havis rilatojn kun la radio-stacio WBAL en Baltimore pri Esperanto. Nun ni ricevas informojn pri intervjuo de "Gene" ĉe la radio-stacio WAYE, Baltimore, dum dekkvin minutoj, pri Esperanto. Oni nomas la programon "Prezentado de Winnie kaj Harry", laŭ la antaŭnomoj de gesinjoroj Phillips kiuj estras la aferon. La intervjuo okazis la 18-an de oktobro, en bela kaj unika studejo aranĝita kiel montra fenestro por la publiko. Kompreneble "Gene" menciis, ke oni ricevos senpagan informon de EANA.



J. J. H.

Translation:

**Learn Esperanto.
It is Easy. Read!**

J. J. HUTCHENS

801 11th St. NW.
Canton

**Lernu
Esperanton
Estas facile.
Legu!**

S-ro J. J. Hutchens, Canton, Ohio, reklamas Esperanton en la tagĵurnalo "The Canton Repository". S-ro Hutchens estas nun emerito de instruado en la lernejoj de Canton, sed li nun daŭrigas instruadon de Esperanto en sia urbo. Inter la diversaj manieroj, kiujn li utiligas por atentigi la publikon pri Esperanto kaj sian pretecon instrui ĝin, estas publika reklamado. Unu el la diversaj reklamoj, kiujn li jam publikigis estas tiu montrita maldekstre. Ni deziras sukceson al li en la klopodado por nia afero. Multaj samideanoj havis la plezuron persone renkonti S-ron Hutchens, kiam li kaj S-ino Hutchens ĉeestis la EANA Kongreson en Newark pasintan someron.

La Familio Héroux, niaj kanadaj organizantoj de sukcesaj Esperanto-kursoj en Trois-Rivières, Kebeko, montriĝas en la foto dekstre. Ni jam havis la honoron presi novaĵojn pri ili en AE (klopodoj por Esperanto en Kebeko, ĉesto ĉe la EANA kongreso en Newark, ktp.) Nun ni ricevas pluan informon pri kursoj por la aŭtuna sezono. S-ino Héroux skribas: "Jen kelkaj detaloj rilate al niaj kursoj. Jam de unu monato proksimume 70 gelernantoj ĉeestas niajn Esperantajn kursojn. La unuan grupon mi instruas en la sportklubo.



La dua estas instruata de mia edzo en la sama loko; kaj la tria, de mia bofratino en la oficejo de la kompanio Bell Telephone." La familio Héroux mirinde bone antaŭenigas Esperanton en sia provinco Kebeko. La foto montras (de maldekstre) la kanadan Esperanto-pioniron *S-ro Charles-Edouard Héroux*, kaj liajn bofilinon kaj filon, *Gesinjoroj Thérèse kaj Georges Héroux*. Bedaŭrinde la ĉarma filino de nia kanada pioniro, *Marguerite*, ne montriĝas en la fotografajo. La foto unue presiĝis en la grava tagjurnalo "Le Nouvelliste", 21an de marto 1957, kune kun longa kaj bona artikolo sub la titolo "Là où les Trifluviens apprennent l'Espéranto" (Tie kie la Tririveranoj lernas Esperanton).

Esperanta Skolt-Organizo en Usono: Petu informon de *S-ro C. Stanley Otto, 20 Harvard Terrace, West Orange, N.J.*, se vi interesiĝas pri Esperanto kaj la skolta movado. S-ro Otto bonvenigas partoprenadon de vi en tiu klopodo por starigi praktikan Esperantan skoltfakon en nia movado tra la tuta Usono.

Esperanto-Klubo MOSAMO, Rolla, Mo., ĉe la *Kolegio pri Minoj* (Missouri School of Mines), komenciĝas tre bone por la sekvonta lerneja periodo. *S-ro Roland Scott* estas la Sekretario. *Prof. John M. Brewer*, Prezidanto de EANA, gvidas la aferon, kiel dum multaj jaroj pasintaj. Prof. Brewer revenis al la kolegia instruado post somera laboro por la usona mararmeo en San Diego. Li estas rezerva oficiro en la mararmeo.

Kalifornia Esperanto-Pioniro, kiu dum kvardek jaroj necesis resti neaktiva pri Esperanto, pro tro da okupado kiel profesiulo, nun estas emerito kaj denove ĝoje aktiviĝas. Li estas *S-ro Erld Wilkinson*. Nur kelkaj monatoj pasis, sed li jam legis multajn librojn, kaj korespondis en bela Esperanto tra la mondo, kaj lastatempe presis vizitkarton tute en Esperanto. Ni kore bonvenas S-ron Wilkinson denove en EANA.

La Terno-Sufikso AĈ (aĉ-uuu!) – Nia bona membro en la *Ĉielarka Biblioteko* en Massachusetts (mas-AĈUUU-sets!) ne ŝatas la "tern-sufikson AĈ" en Esperanto. Nia bibliotekistino elmontras kelkajn ekzemplojn inter kiuj estas la karesnomo "Paĉjo". Kaj ŝi demandas, kial ni utiligas tiun vorteron de malestimo kaj malŝato en unu el niaj plej karaj vortoj, t.e. "Paĉjo"? Vere ŝi ŝajne havas ion tie! Interese! (Ah ĉu?)

Ni funebros nian estraranon J. H. Hartley, Hamilton, Ont., Kanado, kies elekto al la Estraro de EANA dum la Kongreso en Newark estis ĵus anoncita en la pasinta numero de AE. *James Henry Hartley* mortis pro koratako la 19an de septembro 1957, post 2-3 semajna malsano en la hospitalo, laŭ informoj de nia amiko Jaan Kubar. S-ro Hartley havis 69 jarojn. Li estis atestimata inter la Esperantistoj de Kanado kaj Usono, pro siaj praktika aktiveco kaj saĝa vidpunkto rilate al la tutkontinenta movado. Li bedaŭris la skismon en grupetojn en Ameriko, sed klare vidis ke ne estis EANA kiu forlasis la principon de unueco. Pro jaroj da sperto pri tiuj aferoj en la historio de la movado (depost la komenco de EANA en 1905), li forte apogis la sintenon de la plimulto, t.e. unuecon en EANA. Pro tio li konsentis kun amikoj por esti kandidato por la Estraro. Nia Asocio perdis gravan estraranon kaj helpanton. Antaŭ dek jaroj, kaj ĝis 1956, li gvidis Esperantajn klasojn en Hamilton kaj en la kompanio "Westinghouse" kie li laboris. Li morale kaj finance subtenis la Asocion dum la jaroj. Letero kiu montris lian altmoralan karakteron estis presita kun foto de li en AE, marto-aprilo 1954. Li faris unuagradajn poemojn en Esperanto. Bela traduko de la kanada nacia himno, "*L' Acerfoli' por Ĉiam*" (The Maple Leaf Forever), troviĝas en AE, majo-junio 1955. Kaj originala poemo, "*Malliberuloj*" (Captives), en la angla kaj Esperanta lingvoj troviĝas en AE, januaro-februaro 1955. Tiu bela poemo lia temas pri "somerpapilio" kaptita ĉe fenestro, kiu vane flugilbatas tiun por esti libera. Li komparas sin mem kiel unu kiu simile vane sopiras "ĉe la fenestro de la vivo". Ja subite por nia amiko, la fenestro de la vivo ekmalfermiĝis kaj li forflugis de ni. Niajn kondolencojn al ĉiuj liaj karuloj.

Ni funebros nian pioniron C. H. McKinney, Phoenix, Arizona, membron de EANA ekde sia Esperantistiĝo en la jaro 1910. La filo, Durward L. McKinney, Flagstaff, Arizona, informis nin pri lia morto en hospitalo en Flagstaff, la 18-an de junio 1957. Pioniro McKinney havis 87 jarojn. La edzino mortis nur kvin semajnojn antaŭ li. La filo skribas, ke ŝajne la patro ne deziris vivi plu post la forpaso de sia kara edzino. Oni diras, ke li ne suferis, sed malfortiĝis tagon post tago ĝis la fino. Lastatempa letero de li al la Centra Oficejo priskribis kiel li flegis la edzinon, kiu havis artriton, kaj kiel li prizorgis ĉion en la hejmo. S-ro McKinney estis senlaca propagandisto de Esperanto; kaj interese estas, ke dum lia resto en la hospitalo, du flegistinoj interesiĝis pri Esperanto kaj lernis iom da Esperanto. Dum la jaroj li utiligis multajn propagandilojn de EANA, donis abonojn al dek kolegioj kaj altlernejoj en sia regiono, fariĝis patrona membro kaj ĉiumaniere subtenis la Asocion. Li korespondis kun samideanoj en 28 diversaj landoj tra la tuta mondo. Krom profunda amo al la edzino kaj familio, li ŝajne amis la belan monton "Kameldorso" (Camelback), kiu alte staris (pli bone, en aspekto, kuŝis kiel kamelo sur la genuoj) proksime al lia domo tuj ekstere de Phoenix. Tre bela legendo pri "Kameldorso", tradukita en Esperanton de S-ro McKinney, troviĝas kun foto en AE, januaro-februaro 1952. Liaj leteroj al ni montris amindan karakteron. Tri filoj postvivas lin: Durward, William kaj Charles. Al la familio ni esprimas niajn kondolencojn.

ĈARLATANA LINGVOSCIENCO

Marr – Drezen – Stalin – Ĉikobava – Lapenna

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

(Daŭrigo de artikolo en AE de Marto-Aprilo, Majo-Junio, Julio-Oktobro)

“...mi povus...citi multajn elstarajn lingvistojn – ekzemple...Marr... – kiuj havis pri Esperanto tute alian opinion.”

D-ro Ivo Lapenna, en Montevideo, Decembro 1954,
laŭ la gazeto ESPERANTO, Februaro 1955, p. 54.

Marr havis “tute alian opinion” pri Esperanto ol la Esperantistoj. Li diris, ke Esperanto estas lingvo “ne aperinta en oportuna tempo” kaj ke la universala lingvo de la estonteco estos “lingvo de nova sistemo, tute speciala, ĝis nun ne ekzistanta”. Al la sovetaĵ Esperantistoj, kiuj faris propagandon por li, li skribis, ke “la diversaj artefaritaj lingvoj jam praktike funkciantaj, inter kiuj troviĝas Esperanto,” konfirmas la pravecon de la Marr-teorioj kaj “helpas kolekti materialon” por la “estonta komuna lingvo de la homaro”. Tiu lingvo laŭ li povos estiĝi kaj ekzisti nur en komunista “senklasa socio”.

En la lasta parto de sia vivo Marr eĉ fariĝis tute malamika al Esperanto. En 1933 li skribis, ke “Esperanto estis starigita sen la necesa konsidero de la transira kaj revolucia karaktero de la lingvo” (laŭ J. Kuchera, *Linguistic Policy of the Soviet Union*, disertacio en la Harvard-Universitato, 1950, p. 240).

“Arakĉeevaj Metodoj” en la Soveta Scienco

Marr preskaŭ tute detruis ĉion, kio restis de serioza lingvoscienco en Rusujo kaj starigis diktatorecon de siaj propraj ĉarlatanaj teorioj, persekutante tiujn, kiuj kuraĝis esprimi sendependajn opiniojn. Li faris tion per metodoj poste nomitaj “arakĉeevaj” de Stalin (en letero al la juna lingvistino E. Kraŝeninnikova, la 29-an de Junio 1950), de Ĉikobava (en *Vvedenie v Jazikoznanie*, p. 21) kaj de la Granda Soveta Enciklopedio (dua eldono, vol. 26, p. 375).

Aleksej Aleksejeviĉ Arakĉeev estis rusa generalo sub la Imperiestroj Paŭlo I-a kaj Aleksandro II-a. Li organizis sekretan policon kaj persekutis sendepende pensantajn homojn, inter ili profesorojn kaj studentojn, kiuj favoris konstitucian registaron. Puŝkin nomis lin en unu poemo sia

Vsej Rossii pritesnitelj,
Gubernatorov muĉitelj
I Soveta on uĉitelj,
A carju on – drug i brat.

Persekutanto de tuta Rusujo,
Turmentanto de guberniestroj,
Instruisto de la Konsilantaro,
Amiko kaj frato de la caro.

Se oni volas akcepti la vortojn de Stalin pri la “arakĉeevaj” metodoj de Marr kaj liaj posteuloj, oni devas demandi, kiel unu profesoro – Marr – povis persekuti aliajn profesorojn. La evidenta klarigo estas, ke la diktatoreco de Marr estis starigita kaj konservata de la politika diktatoro, Stalin. Iomete ŝanĝante la versojn de Puŝkin, oni povas diri pri Marr, ke li estis “persekutanto de lingvistoj, ... amiko kaj frato de la ruĝa caro, Stalin.”

Malmultaj personoj ĝuis tiom da honoroj kaj titoloj sub la Stalin-reĝimo kiel Marr. En 1928 li ricevis la Lenin-Premion; en 1929 li fariĝis Membro de la Komunista Akademio kaj Kandidat-Membro de la Centra Ekzekutiva Komitato de la Sovetoj, en 1930 Vicprezidanto de la Soveta Akademio de Sciencoj, en 1931 Membro de la Centra Ekzekutiva Komitato de la Sovetoj. En 1933 li ricevis la Lenin-Ordenon. En la sovetaj laboristaj sindikatoj li prezidis la Sekcion de Sciencistoj.

Marr, kiun Lapenna nomis "elstara lingvisto" en la UNESCO-Konferenco en Montevideo kaj "granda rusa lingvisto, historiisto kaj etnologo" en *Retoriko* kaj kiun li laŭdis pro lia "senlaca laborado, esplorado, ekzamenado kaj analizado", ne nur tute ruinigis – kun la beno de Stalin – la sovetan lingvosciencan, sed havis similan detruan efikon en la arkeologio. Al legantoj, kiujn tiu temo interesas, mi rekomendas libron de la ukraina arkeologiisto Miĥail Miller. Angla traduko aperis en New York en 1956 (*Mikhail Miller, Archaeology in the U.S.S.R.*, eldonejo Praeger).

La diktatoreco de Marr kaj liaj posteuloj komenciĝis parte en 1926, kiam baza artikolo de Marr aperis en la "scienca" revuo de la Komunista Internacio, *Pod Znamenem Marksizma* ("Sub la Standardo de Marksismo"), ankaŭ en franca, germana kaj aliaj lingvoj. La diktatoreco fariĝis absoluta en 1931, iom mildiĝis post la Dua Mondmilito kaj finiĝis en 1950.

Drezen Partoprenis Opozicion Kontraŭ Marr

En 1930-1931 malsukcesis klopodo transformi la Marr-teorion aŭ anstataŭi ĝin per io nova. Dek junaj lingvistoj proksimaj al la Komunista Akademio, inter kiuj troviĝis Drezen, fondis grupon, kiun ili nomis *Jazikfront* (Lingva Fronto). En manifesto, kiu aperis en la revuo *Literatura i Iskusstvo* (Literaturo kaj Arto), ili proklamis sian volon, batali por "vere marksista lingvoscienco" kontraŭ la "idealismo", la "formalismo" kaj la "eklektikismo" de la hindoeŭropa kompara lingvoscienco, sed ankaŭ kontraŭ la "mekanistaj" tendencoj en la Jafetida Teorio. G. Danilov estis la gvidanto de la grupo, J. Loĵa kaj T. Lomtev estis ĝiaj ĉefaj teoriaj defendantoj. Ili kritikis la instruojn de Marr pri la magia origino de la lingvo kaj pri *sal, ber, jon* kaj *roŝ*. Lomtev skribis, ke "la Jafetida teorio, kiu iam reprezentis revolucian kaj progreseman fenomenon, fariĝis baro al la ellaborado de reala marksista-leninista lingvoscienco".

La kontraŭatako de la Marr-anoj kontraŭ *Jazikfront* venis unue en la formo de broŝuro, *Protiv burĵuaznoj kontrabandi v jazikoznanii* ("Kontraŭ burĝa kontrabando en la lingvoscienco"), poste en la formo de komando de Stalin, kiu ĉesigis la *Jazikfront*-grupon kaj kunfandis la Instituton de Literaturo kaj Lingvistiko de la Komunista Akademio, en kiu estiĝis *Jazikfront*, kun la Jafetida Instituto (poste Instituto de Lingvo kaj Pensado) de Marr.

La lastan fojon la potenco de la "arakeevaj" metodoj de la Marr-anoj montriĝis en 1949, kiam oni festis la 85-jaran jubileon de la naskiĝo kaj la 15-jaran jubileon de la morto de Marr. En N-ro 3 de la revuo *Voprosi Filozofii* (Problemoj de Filozofio) A. G. Spirkin skribis pri la ceremonioj en Moskva kaj Leningrad: "Ĉiuj partoprenantoj deklaris, ke krea pritrakto de lingvaj problemoj estas ebla nur sur la bazo de la materialista instruo pri la lingvo formulita de N. J. Marr... Ĉiuj partoprenantoj unuanime postulis, ke plej energia batalo estu organizata kontraŭ klopodoj

revivigi reakciajn, burĝajn teoriojn en la lingvoscienco kaj la formalan komparan metodon en la lingvistiko.”

Kiam tiu artikolo aperis, la morto de la Marr-teorioj jam estis proksima. Eble estas bone, priskribi tion, kio okazis, laŭ la artikolo de D-ro Valentin Kiparsky, Profesoro de Rusa Lingvo kaj Literaturo en la Universitato de Helsinko: “Arnold Ĉikobava, gruzo nekonata en la Okcidento, estis veninta en konflikton kun la Marr-anoj... kaj la konflikto estis tia, ke ĝi ŝajnis signifi la finon de lia kariero. La apero de kuraĝa fakulo kiel Ĉikobava estis ebleco, kiun la Marr-anoj ne estis konsiderintaj en siaj kalkuloj. Riskante ĉion, li iris al sia ĉiopova samnaciono en la Kremlo. Oni scias, ke Stalin dum sia juneco okupiĝis pri problemoj de malplimultoj kaj komprenis lingvajn kaj naciecajn problemojn pli bone ol politikistoj ĝenerale. Ĉikobava sukcesis konvinki la diktatoron pri la neceseco de radikala purigo de la soveta lingvoscienco. Stalin kompreneble ricevis la tutan honoron de la genia retrovo de la malnova racia kompara lingvoscienco, dum la rolo de Ĉikobava konsistis nur en la malfermo de la batalo. La rezultoj de tiu kontreguligo fariĝis sufiĉe konataj per la gazetaro kaj la stalinista propagando.” (*Osteuropa*, Februaro 1957, paĝo 88.)

125 000 Ekzempleroj de Libro de Ĉikobava

La eksterminado de la Marr-teorioj estis radikala. La Marr-Instituto de Lingvo kaj Pensado kaj la Instituto de la Rusa Lingvo estis kunigitaj en nova Lingvosciencia Instituto (*Institut Jazikoznaniĵa*) de la Soveta Akademio de Sciencoj. La ĉefaj reprezentantoj de la “arakĉeeva” Marr-reĝimo, inter ili Akademiano Ivan Ivanoviĉ Meŝĉaninov, publike kaj laŭte “konfesis” siajn erarojn laŭ bone konataj modeloj. Lingvistoj, kiuj suferis sub la persekuto de la Marr-anoj, ricevis honorojn. La plej grava el ili, V. V. Vinogradov, fariĝis ĉefredaktoro de nova revuo *Voprosi Jazikoznaniĵa* (Problemoj de Lingvoscienco).

Ĉikobava, kiu kuraĝis paroli al Stalin kiel unu gruzo al alia – kontraŭ la mortinta gruzo Marr – ricevis komision, verki la unuan, ĉefan parton de la oficiala lernolibro de la stalinista lingvoscienco por la sovetaj universitatoj kaj pedagogiaj institutoj. De tiu libro, kiu sur preskaŭ ĉiu paĝo donas lakean laŭdon al la “genia” Stalin kaj piedbaton al la fuŝulo Marr, mi posedas la duan eldonon, publikigitan en Moskva en 1953. La verko indikas sur la lasta paĝo, ke oni presigis 125 000 ekzemplerojn.

La batalo de Stalin kaj liaj ŝildportantoj kontraŭ la Marr-teorioj havis tri tute malsamajn aspektojn. Estas necese distingi inter ili, se oni volas kompreni, kiel la afero koncernas Esperanton. Unue, sub la influo de Ĉikobava, Stalin decidis forbalai la ĉarlatanaĵojn de Marr, ebligi pozitivan laboron de sovetaj lingvistoj kaj kunlaboron kun eksterlandaj lingvistoj, kiam tio estus utila. Tiu unua ago estis necesa kaj bona. Due Stalin volis prezenti sin mem kiel genian lingviston kaj fari siajn teoriojn (aŭ tiujn de Ĉikobava) devigaj por la lingvoscienco en Rusujo kaj en aliaj landoj sub komunista reĝimo. Multaj el tiuj teorioj tute ne estis novaj, sed estis la tradiciaj tezoj de la okcidenta kompara lingvoscienco, sed oni servis ilin kun marksista-leninista saŭco kaj tordis, amputis kaj ŝanĝis ilin por ilin akordigi kun antaŭaj diraĵoj de Stalin kaj ankaŭ kun diraĵoj de Marx, Engels kaj Lenin. Oni ĵetis kelkajn ekstreajn fuŝajn teoriojn en la kaldronon, eble ĉar la lingvistika “revolucio” okazis tre

rapide. Fakte do, almenaŭ parte, nova ĉarlataneco anstataŭis la ĉarlatanecon de Marr.

La tria aspekto de la afero estis tute ne lingvosciencia, sed politika. Stalin serĉis lingvistikajn argumentojn por kaŝi imperialistajn celojn. Kompreneble tiuj celoj ekzistis tute sendepende de la lingvoscienco. Pri tio mi ankoraŭ parolos.

Kiel kritika prijuĝo de Marr ne necesigas akcepton de la tezoj de Stalin, tiel kritika pritrakto de *La Marksismo kaj la Problemoj de la Lingvoscienco* de Stalin tute ne postulas konstaton, ke Marr estis prava. Kial ni elektu inter du ĉarlatanoj anstataŭ forĵeti ambaŭ?

Tio rekondukas nin al la *Nefermita Letero al Stalin*, kiun verkis D-ro Ivo Lapenna kaj kiun subskribis la Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Plenumkomitato de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Majo 1952. Tiu dokumento de konfuzo, anstataŭ kritiki la multajn erarojn de la komunista diktatoro, kritikis lin pro lia kondamno de la fuŝa tezo de Marr pri la klasa karaktero de la lingvo. Tiun evidentan stultaĵon jam estis kondamnintaj la junaj lingvistoj de la *Jazikfront*, inter ili Drezen, en 1930. (Tion klarigas ekzemple bonega artikolo de Profesoro Lawrence L. Thomas de la Universitato de Kalifornio, *Some Notes on the Marr School*, en la revuo *The American Slavic and East European Review*, Oktobro 1957, pp. 323-348.)

Kraŝeninnikova - Stalin - Lapenna

Unu parto de *La Marksismo kaj la Problemoj de la Lingvoscienco* konsistas el respondoj de Stalin al E. Kraŝeninnikova, juna lingvistino, kiu parolis en la nomo de "la lingvistoj, inter ili ankaŭ ni, la junularo". Jen ŝia tria demando al Stalin: "Tute prave vi parolas pri tio, ke la ideoj, imagoj, kutimoj kaj moralprincipoj de burĝoj kaj proletarioj estas tute kontraŭaj unuj al la aliaj. La klasa karaktero de tiuj fenomenoj evidentiĝas en la semantika flanko de la lingvo kaj kelkfoje eĉ en ĝia formo, en la vortprovizo, kiel vi prave diras en viaj artikoloj. Ĉu en la analizo de konkreta lingva materialo kaj antaŭ ĉio de la senca flanko de la lingvo estas eble paroli pri klasa esenco de la nocioj per ĝi esprimitaj, precipe en kazoj, kiam temas ne nur pri lingva esprimo de homa penso, sed ankaŭ pri la rilato de la homo al la realeco, kiam lia klasa aneco manifestiĝas kun speciala klareco?"

Jen la respondo de Stalin (aŭ Ĉikobava): "Pli koncize, vi volas scii, ĉu la klasoj influas la lingvon, ĉu ili portas en la lingvon siajn specifajn vortojn kaj esprimojn, ĉu povas okazi, ke homoj atribuas al la samaj vortoj kaj esprimoj malsaman signifon laŭ la klasa aneco. Jes, la klasoj influas la lingvon kaj portas en la lingvon siajn specifajn vortojn kaj esprimojn. Pri tio oni ne povas dubi. Sed el tio ne rezultas, ke specifaj vortoj kaj esprimoj kaj semantikaj diferencoj havas grandan signifon por la evoluo de nacia lingvo, ke ili povas malfortigi ĝian gravecon aŭ ŝanĝi ĝian karakteron. Unue, ekzistas tiel malmultaj tiaj specifaj vortoj kaj esprimoj kaj tiel malmultaj kazoj de semantikaj diferencoj, ke ili prezentas apenaŭ unu procenton de la tuta lingva materialo. Sekve, la tuta cetera grandega plimulto de vortoj kaj esprimoj kiel ankaŭ ilia semantiko estas komunaj al ĉiuj klasoj de la socio. Due, specifajn vortojn kaj esprimojn, kiuj havas klasan nuancon, oni uzas en la lingvo ne laŭ la reguloj de ia 'klasa gramatiko', kiu fakte ne ekzistas, sed laŭ la reguloj

de la gramatiko de ekzistanta nacia lingvo. La ekzisto de specifaj vortoj kaj esprimoj kaj la fakto, ke en la semantiko de la lingvo troviĝas diferencoj, do ne refutas, sed konfirmas la ekziston kaj necesecon de nacia lingvo.”

Pri ĉi tiu teksto, kiun mi citis sen mallongigoj, niaj legantoj eble diros, ke oni ne bezonas tiom da vortoj por montri, ke – kontraŭe al la instruo de Marr – naciaj lingvoj ekzistas kaj ke la teorio pri la klasa karaktero de la lingvo estas erara.

Sed ni vidu, kion Lapenna en la *Nefermita Letero al Stalin* faris el tio. Li citis du frazojn el la respondo de Stalin: “Da tiaj specifaj vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ da kazoj de diferencoj en la semantiko, estas tiom malmulte en la lingvo, ke ili eble-eble prezentas unu procenton de la tuta lingva materialo. Sekve, la tuta cetera grandega plimulto de vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ ilia semantiko, estas *komuna* (substrekiis J.V.S.) al ĉiuj klasoj de la socio.”

Tion tuj kontraŭdiris Lapenna en la *Nefermita Letero*: “*La realaĵo estas precize inversa*. La plej evoluintaj lingvoj posedas hodiaŭ ĉirkaŭ 400 000 vortojn. Shakespeare – la verkisto la plej riĉa je vortoj – skribis ĉiujn siajn verkojn per iom pli ol 14 000 vortoj. Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la 19-a jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn! Meze kleraj homoj posedas kutime 4 000 - 5 000 vortojn. Tio signifas, ke la meza individua vortprovizo estas proksimume 1 procento de la tuta vortaro de iu lingvo. Tio plue pravas, ke la vorta materialo, kiu estas fakte komuna al ĉiuj membroj de iu lingva komunajo, inkluzivante do ankaŭ la plej malklerajn tavolojn, estas eĉ multe pli malalta ol unu procento de la tuta vortprovizo de la koncerna lingvo. *Ĝio alia apartenas al la apartaj ne nur klasoj, sed ankaŭ profesioj, fakoj kaj eĉ flankaj okupoj, kiaj estas la sporto, ludo, k. s.*”

“Nefermita Letero”, Nekredeble Kruda Fuŝaĵo

El tiuj konstatoj Lapenna saltas en argumentojn pri internaciaj vortoj, kiuj estas tiel multnombraj, ke ili povis formi la bazon por Esperanto. Kun la argumentoj mem mi grandparte konsentas, kvankam kelkaj el la detaloj, kiujn la *Nefermita Letero* uzas en ilia prezentado, ŝajnas al mi eraraj aŭ netaŭgaj. Sed la maniero, en kiu Lapenna atingas la argumentojn, estas nekredeble kruda fuŝaĵo. Mi jam en la unua parto de mia artikolo montris, ke la nombroj, kiujn Lapenna uzas supre, estas malĝustaj kaj ke ilia uzo en dokumento subskribita de UEA kaj SAT povas ridindigi la Esperanto-movadon. La ŝonglado, per kiu Lapenna intermiksas la teoriojn de Marr pri la klasa karaktero de la lingvo kaj la neekzisto de komuna nacia lingvo kun la fakto, ke ekzistas internaciaj vortoj, el kiuj multaj estas fakaj vortoj, estas fantazia kaj vere miriga. Ĉu do vere ekzistas “klasoj” de kemiistoj, dentistoj, juristoj kaj eble eĉ filatelistoj kaj ŝakludantoj en la socio? Ĉu do vere la “lingvo” de franca kamparano havas ion komunan kun la “lingvo” de serba kamparano, aŭ la “lingvo” de brita laboristo kun tiu de svisa laboristo, anstataŭ havi ion komunan kun la “lingvoj” de la aliaj klasoj en la propra lando?

Marr kaj la stalinista lingvoscienco de antaŭ 1950 diris, ke ĉiu lingvo estas klasa lingvo kaj ke komuna nacia lingvo ne ekzistas. Ĉikobava kaj la stalinista lingvoscienco de post 1950 diris, ke apenaŭ unu pro-

cento de la vortoj havas klasan karakteron kaj ke la baza vortprovizo kaj la gramatiko donas al lingvo nacian karakteron. Lapenna diras, ke la malo estas vera, ke do Marr estis prava, ke malpli ol unu procento de la vortprovizo de iu lingvo estas komuna al la tuta nacio kaj ke tio estas argumento por internacia lingvo.

En alia parto de ĉi tiu studo mi kritikis la subskribon de la Estraro de UEA sub la *Nefermita Letero*. Mi nun emas opinii, ke mi eble estis tro severa. Unu el la tiamaj Estraranoj de UEA skribis al mi: "En tiaj diskutoj ne decidus la grado de inteligenteco aŭ de faka sperto. Mi mem estis kontraŭ la ideo de Nefermita Letero al... Stalin. Sed Profesoro Lapenna per sia konata volforto kaj parolkapablo decidigis la ceterajn anojn... La situacio en la Estraro de UEA estis tia, ke ni daŭre vivis sub la premo de eterna minaco flanke de D-ro Lapenna. La kvereloj... kelkfoje ne estis plu tolereblaj. Foje D-ro Lapenna ne partoprenis kunvenon, kaj tiam la Prezidanto, Malmgren, kun libera spiro diris: 'Nunjare ni havos pli trankvilan kunsidon.'..."

Ni ja nun konas ankaŭ aliajn ekzemplojn de la maniero, en kiu "unuanimaj" decidoj estas farataj en UEA sub la Lapenna-reĝimo.

(Daŭrigota)

ESPERANTO CHRISTMAS CARDS

No. 1 *Beautiful, super-quality Esperanto Christmas cards.*

The outside cover design: A large Esperanto Green Star, cleverly made up as Santa Claus, printed on a background of white de luxe "Fiesta" paper with art deckle edge dyed a beautiful green. The message in Esperanto inside: Appropriate and in good taste, surmounted by a small green star, ends with the old familiar greeting *Ĝojan Kristnaskon - Feliĉan Novjaron*. The matching envelopes have the same green deckle edges on the back flap. Size 4 3/4 x 6 3/4 inches. Postpaid. Net prices include envelopes:

12 for \$2.35; 24 for only \$3.50 (less than 15¢ each); sample for 25¢

No. 2 *Assortment of 10 Christmas postcards, each with a different Esperanto design, printed in three and four colors. All with bright, cheerful illustrations and the Esperanto greeting: *Bondeziras por Kristfestoj kaj Novjaro*. In sets of ten.*

10 cards for 60¢; 50 for only \$2.50; sample for 10¢ - all postpaid

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.



*Ĝojan Kristnaskon
Feliĉan Novjaron*

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondukupon): Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Brazilo.** Ary Melo, Rua Rui Barbosa 816, *Teresina-Oiavi*. Dez. kor. kun geesperantistoj de Usono. Aŭfranku bele.
- Germanujo.** Felix Klötzer, Kirschauer Weg 161 Z., *Wilthen i. Sa.* 42-jara, dez. kor. pri ĉio, precipe kun iu en New York.
- Hispanujo.** Evaristo Gil P., Apartado 875, *Barcelona*. Dez. kor. kun Usonanoj kaj ricevi UN-poŝtmarkojn.
- Hispanujo.** Donaciano Herreros Bajo, B. La Sal 41^o - 8, *Leon*. 27-jara, venos al Usono por studi matematikon kaj fizikon, tial dez. kontaktigi kun usonaj Esperantistoj.
- Hispanujo.** H. Rialto, Plaza Caudillo 9, *Valencia*. Deziras korespondi kun Kanadanoj.
- Hungarujo.** S-ino Andrásné Mattyasovszky, Frankel Leo u. 6, *Budapest II*, Dez. kor. kun Esp-istoj en Ameriko kaj ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. inkl. muziko, arto, ktp. Certe respondos.
- Japanujo.** F-ino Ĉisato Jamagata, 2-5 Otaki-cho, *Yokosuka*. 23-jara studentino de medicino, katolikino, dez. kor. kun usonanoj.
- Jugoslavujo.** F-ino Dragica Soldo, Botičev trg 4/I, *Zagreb*. 35-jara oficistino, dez. korespondi.
- Pollando.** Inĝ. Antoni Uliński, ul. Gołębia 3, *Kraków*. Deziras korespondi pri moderna arkitekturo.
- Pollando.** Helmut Siwoń, ul. Planetorza 2, *Koźle, woj. opolskie*. Dez. kor. kun junaj usonanoj pri ĉio kaj iŝ. ilustr. ĵurnalojn kaj PK.
- Boletin**, monata organo de la Hispana Esperanto-Federacio, bele presita parte en Esperanto parte en Hispana lingvo. Interesaj raportoj pri la enlanda movado, kun bonaj artikoloj literaturaj. Jarabono \$1.25. Abon-eblo ĉe EANA, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y.
- American Esperantists** will enjoy reading "*The British Esperantist*", official organ of the British Esperanto Association. Monthly, 20 pages, illustrated. Partly in Esperanto, partly in English. Subscription one year \$1.50; order thru EANA. Free specimen copy from the British Esperanto Association, 140 Holland Park Ave., London W. 11, England.

INTRODUCTION TO ESPERANTO

The Universal Language
3rd Edition - Price \$2.00



Sent on five days
examination FREE.

Box 792, Placerville, Calif.

ESPERANTO-INSIGNOJ



No. 7



No. 6



No. 11



Pendant



Tie-pin



No. 2

Button or Brooch 50¢ — Pendant 60¢

Order from EANA.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

- PRACTICAL ESPERANTO**, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated..... \$.25
- REED'S PRACTICAL GRAMMAR**, Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price..... .35
- ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE**, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....Paper \$1.50; Cloth 3.00
- NOUVEAU COURS D'ESPERANTO**, R. Levin. Esperanto textbook in French, 16 lessons, with Esperanto-French & French-Espo vocabularies, 175 pp.... .85
- ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY**, Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....Cloth 2.00
- ESPERANTO (World Language Series)**, Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc..... .25
- WORLD'S CHIEF LANGUAGES**, Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....Cloth 6.00
- EDINBURGH DICTIONARY**. Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....Cloth .80
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....Cloth 2.35
- FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**. Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....Cloth 2.25
- PLENA VORTARO DE ESPERANTO**, Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The new latest edition, all-Esperanto dictionary with *Suplemento*, 511 pp., 4x5½.....Cloth 3.25
- Rare, deluxe printed edition, large format, better paper and binding....Cloth 6.00
- FUNDAMENTA KRESTOMATIO**, Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....Paper 1.85
- Latest edition, with additional foot-notes, etc., de luxe printing,..... Cloth 2.95
- KARLO**, Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp... .25
- THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)**. The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....Cloth 2.00
- ESPERANTO SORTIMENTO**. Five books, good reading at low cost: *Akrobato de Nia Sinjorino*, legend of France, 25 pp; *Blanche-Virgulino de Lille*, medieval romance, 42 pp; *Lando de Argenta Akvo*, story of Far West, 48 pp; *Miserere*, music story, & *Thais*, by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; *Roziĵo Ciomiljara*, the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only..... 1.00
- RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS**. Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Serba, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection... 2.75
- INDIAN BEAD STAR**. Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch.. .85
- GREEN STAR PENDANT**. Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia... .60
- ENAMEL GREEN STAR**. Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch.. .50
- On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch... .50
- On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch.... .50
- On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only..... .50

(Members of EANA receive 10% in Book Dividends.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "Vinylite" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor.*
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only \$36.*

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order **NOW:**

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.